

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA
KAJ KULTURA REVUO

NUMERO 1 (219)
JANUARO-MARTO 2009
VOLUMO 43

2009 1

Editeur : MCE, Grésillon, 49150 Baugé, France.
Directeur de publication : Dominik Bertrand.
Imprimeur : D. Bertrand, MCE, Grésillon, 49150 Baugé.
Dépôt légal mars 2009. ISSN 1272-5188. 2 €.

Abonu Kulturajn Kajerojn por 2009

1^a paŝo :

Informu pri la poŝta adreso, kien ni sendu la revuon, al
Dominik Bertrand, 7, rue des Brûlis, 77320 Jouy-sur-Morin, France
« nasf2008@orange.fr »

aŭ al peranto.

2^a paŝo :

Pagu 10 eŭrojn, precizigante por kiu vi pagas, al
« Maison culturelle de l'Espéranto »
dum via venonta vizito al Greziljono aŭ al peranto.

Atentu :

Komence de jaro ni ne plu sendos la revuon al tiu, kiu ne pagis
sian ĵus pasintan jaron.

Kovrilpaĝo

La 30^{an} de aŭgusto 1952

okazis oficiala inaŭguro de la kulturdomo Grésillon.

Tiama kolora fotoĵo malfacile troveblas ;

dankon al André Frangeul kaj Pierre Jagueneau.

Niaj komputoroj uzadas nur liberajn kaj senpagajn programojn,
sen escepto, dank' al Linukso Ubuntu. Nia programo por enpaĝigi
estas Scribus 1.3.3 perfekte funkcia en Esperanto.

Kulturaj Kajeroj JARO 2009, NUMERO 1

HISTORIO DE LA KULTURDOMOJ

Sub la granda kverko de Greziljono : p. 2

Ni memoru *sinon* Micard; Pasporto al la tuta mondo;

Pri nia revuo.

KLERIĜADO

Historio : p. 8

Nefidinda Fonto en "Originala Verkaro" de Zamenhof (1929)

Pentrado : Pentrado sur objektoj p. 12

DISTRIĜADO

Kanto : Nova Danco, Esperanto-tango p. 14

Memoraĵoj de artistino : p. 18

Kun krajono en la poŝo.

Biografio de laboristo : p. 23

Bonkondukta Militisto!

Ludo : la Enigmo de Tutokajmono p. 27

Ĉi unua eldono laŭleĝe deponita en Francio en marto 2009. ISSN 1272-5188

Verkintaro :

Jean Amoureux, André Aude, Dominik Bertrand, Brigitte Bourdet,
Lilli Giloteaux, Klod Martins, Lorenzo Tomezzoli, Juanita Turbillon.

Korektintoj : Jeanik Marolleau, Christian Rivière.

La partituron enkomputorigis Yannick Mougeot.

Direktoro de la revuo : Dominik Bertrand.

Ni memoru Sinon Micard

Verkis
André Aude.

DE LA plej frua tempo de la ekzisto de la esperantista kulturdomo, mi ofte tien iris, kaj havis la plezuron konatiĝi kun tre valoraj personoj. Ekzemple, kun la unua grupo de britaj esperantistoj tie venintaj, mi amikiĝis kun tre valora paro. Gesinjoroj Brownlee,



Foto 1. – Julion 1953, kelkaj anoj de la brita grupo. Maldekstre staras gesinjoroj Brownlee, sub la literoj « DO » staras André Aude.

agemaj esperantistoj, multege laboris por disvastigi Esperanton en la regiono de Hexham, kunlabore kun Marjorie Boulton, tiama gimnazia direktorino en tiu urbo.

Mi konis ankaŭ grupon de junaj germanaj gajuloj, kiuj havis kiel signalkrion « Ovo, ovo ! »

Mi longe memoros nian viziton de Parizo. Ni ilin dispartigis en du grupojn, mi gvidis unu el la du grupoj. Ni ne uzis la saman vojon. Alvenante sub la Eiffel-turo ni mire aŭdis desupre :

« Ovo, ovo ! »

La unua grupo jam troviĝis sur la unua etaĝo, sed ili ne vidis la triumfarkon.

Tion mi diris por sciigi, ke mi vidis multon el la eventoj en Grésillon ekde la komenco.

Ofte kun intereso mi legas la raportojn, eĉ la tabulon en la enirejo, laŭdantajn S^{ron} Micard. Fakte dank' al lia longa kaj energia baraktado ni ĝuas la ekziston de la esperantista kulturdomo Grésillon. Mi plene konsentas, ke ni omaĝu al li.

Sed tre ŝokas min, ke oni ne skribas :

Gesinjoroj Micard,

ĉar S^{ino} Micard gigante laboris en tiu loko. Plurajn fojojn mi vidis ŝin, kiu kunportis per ĉarumo pezajn ŝarĝojn de tukoj al la lavejo, kaj kiu lavis ilin. Ŝi laboris ankaŭ en la kuirejo, helpis por servi la manĝojn, purigis la domon, ktp., ĉiam bonhumora, eĉ kiam, al ŝerculoj taŭzetantaj ŝin, ne kolere ŝi ĵetis sian faman :

« Futu al mi la pacon ! » (1)

Neniu sinjorino tiom donis de sia persono por la sukceso de Grésillon, kaj neniu volus tion fari. Tial ŝi ne estu forgesita.

(1) « Lasu min pace ! » en ĵargono de franca komencanto.

Pasporto al la tuta mondo

Pri Greziljona staĝo
verkis Juanita Turbillon.

MI ŝATAS kaj uzas la metodon *Mazi en Gondolando*, surkasedan metodon por instruado de Esperanto. Mi aŭdis pri alia metodo, *Pasporto al la tuta mondo*. Mi vidis plurfoje, dum kongresoj, eretojn, kiuj ne tro plaĉis al mi.

Do, kiam mi legis en la programo de Grésillon, ke Steve Wagenseller uzos tiun metodon por komencantoj, mi aliĝis al lia kurso. Ĝi okazis de la 5^a ĝis la 12^a de julio 2008.

La staĝanoj ne estis multaj. Efektive ni estis nur du en tiu kurso, kaj la dua lernantino ankaŭ ne estis komencantino. Steve Wagenseller bone komprenis mian celon. Li montris al ni ĉiujn ekzercojn, ĉiujn aldoniĝojn al la metodo.

Estas avantaĝoj kun malmultnombra lernantaro, eĉ se por la organizantoj ne estas tiel bona afero! Mi tre ŝatis la staĝon. Oni parolis preskaŭ nur Esperante dum la tago, dum la manĝoj. La amikino, samkursanino, bone progresis en la lingvo kaj ankaŭ tre kontentis.

En Roterdamo, dum unu tago, unu el la roluloj de la filmo promenis en la kongresejo vestite kiel en la filmo, kun longa blanka robo kaj laŭra krono surkape. Mi salutis lin :

« Bonan tagon, filozofo. »

Kaj mi rakontis la staĝon al li, kaj propagandis pri Grésillon. Estis la greka filozofo de la filmo. Tiuj strangaj vestaĵoj iom ĝenis min, sed

dank' al Steve Wagenseller, mi povis pli bone koni kaj aprezi la metodon. La pedagogia parto, pli adaptita al usonanoj, estas bona kaj klara. La ekzercoj, multnombraj kaj variaj, certe donas bonajn rezultojn.

La staĝo estis tiel agrabla, kaj mi tiel amas Grésillon-on, ke mi reiris tien dum aŭgusto por ripozi post la laciga kongreso.




Foto 2. – La 11^{an} de julio 2008, pozas : Francine Bounhoure (1), Serge Sire (2), Maryvonne Houviez (4), Brigitte Bourdet (5), André Bourdet (6), Franjo Levêque (7), Jeanik Marolleau (9), Steve Wagenseller (10), Edmond Margot (11), Jeannine Daguin (12), Guy Martin (13), Louis Jeuland (14), Hélène Delachartre (16), Danielle Margot (17), Michel Dechy (18), Juanita Turbillon (19).




Foto 3. – La 8^{an} de aŭgusto 2008, pozas : Nicky Jansen (1), Claude Trésorier (3), Caroline Mauboussin (4), Aurora Bute (5), Tereza Depecker (6), Juanita Turbillon (7), Gražina Opulskienė (8), Josette Ducloyer (9), Lorenzo Tomezzoli (10), Nina Korĵenevskaja (11), Jean-Pierre Ducloyer (12), Sylvie Ternant (13), Jannick Huet (14), Juanjo Crespo (15), Véronique Elain (16), Thierry Menan (17), Bertrand Gilet (18), Adeline Ternant (19), Emilio Perez Gimeno (20), Pablo Tomás Conesa (21), Maria Cruz Perez Martín (22), Claude Martins (23), Emilio Perez Martín (24), Guy Brochard (25).

Pri nia revuo

Leteron sendis al ni
Jean Amoureux.

EN OMAĜA artikolo al Jeannine Vincent en *Franca Esperantisto* de majo 2000 mi skribis :

« Kun Pierre Babin ŝi apartenis al la redakcia komitato de *Kulturaj Kajeroj*. Ilia "Ĝis!" en la junia-decembra kajero de 1999 espereble sonos nur kiel paŭzo, sed tute ne kiel mortosigno de la posteulo de la iama *les Cahiers de Grésillon*. Ĝi baldaŭ eliru el komprenebla dumtempa letargio same kiel, paŝo post paŝo, la pluvivo de Grésillon, kiu mem nun ŝajnas esti ebla. »

Do imagu, kiom ĝoja mi estis, kiam mi ricevis ekzempleron de la feniksaj *Kulturaj Kajeroj*!

En epoko kiam malaperas iom post iom la tradiciaj revuoj kaj homkontaktoj profite al nesenteme frida ekrano, kiu absolute ne allogas min, tre sincere mi tutkore gratulas vin.

Por mi interesa estis la enhavo, kaj mi ŝatas la multajn fotojn kaj vian lertan manieron senerare loki la nomon de la fotitoj, kiam temas pri grupfotoj. La lingvaĵo kaj la temoj, la formato, la « aerumita » enpaĝigo, ktp. igas la tuton por mi esperiga kaj dankinda.

Nefidinda Fonto en "Originala Verkaro" de Zamenhof (1929)

Verkis
Jean Amoureux.

DANKA letero al la franca ministro de Publika Instruado : la konata traduko ne estas de Zamenhof !

Post ordeniĝo de Zamenhof kiel kavaliro de Honora Legio, historie grava estas la letero de Sebert al Zamenhof (1) :

« La 3^{an} de oktobro 1905.

« Kara doktoro ! – Laŭ konsilo kaj deziro de D^{ro} Javal mi sendas al vi projekton de letero adresota al la franca Ministro de la publika instruado por danki lin persone pri lia partopreno en la honoro al vi farita de la franca registaro.

« Mi opinias, ke preter la letero, kiun mi konsilis vin sendi al la Ministro de fremdaj aferoj (vidu mian leteron de la 23^a de septembro), vi bone faros sendante ankaŭ tiun ĉi leteron al tiu alia Ministro.

« Aliparte D^{ro} Javal petis, ke vi sendu ĝin per lia pero kun traduko en Esperanto. Li intencas uzi tiun tradukon por komuniki al la gazetoj, ĉar estas nun utile montri, ke la propagando de la lingvo internacia ne malutilas la propagandon de la lingvo kaj de la influo francaj. Oni penadis por inspiri al nia Ministro de la publika instruado tiun antaŭjuĝon kontraŭ nia afero, kaj ni devas klopodi por diskrete kaj prudente kontraŭbatali. Tia kongreso okazinta antaŭ ne longe en Lieĝo por la propagando de la franca lingvo, sub la prezido de nia Ministro mem, kiu estis ankaŭ granda sukceso, estas mal-

favora fakto por ni. Ĝi helpas la penadojn de niaj malamikoj, kaj estas necese prepari kontraŭan militon almenaŭ en nia lando. »

Same grava estas la projektita danka letero al tiu ministro, tra lia kabineto, france verkita de Sebert por Zamenhof (2) :

« Monsieur le Ministre – J'apprends que votre influence a contribué pour beaucoup à l'honneur que m'a fait Monsieur le Président de la République en m'admettant dans les rangs de la Légion d'honneur, et je tiens à vous adresser personnellement mes remerciements pour ce précieux encouragement accordé par le Gouvernement français à la cause de la langue internationale auxiliaire.

« Il m'a été très agréable, Monsieur le Ministre, de voir cette cause si bien accueillie dans un pays qui, toujours, s'est mis à la tête des progrès humanitaires.

« J'ai été aussi très flatté de l'accueil bienveillant que vous m'avez fait dès le lendemain de mon arrivée à Paris.

« Après le grand succès du Congrès international Espérantiste de Boulogne sur mer, il doit m'être permis d'espérer que la France sera la première à introduire dans les écoles publiques l'enseignement d'une langue qui facilitera et développera indéfiniment les relations entre les peuples et, par suite, assurera la propagation des idées libérales auxquelles le nom de la France est indissolublement attaché.

« Veuillez agréer, Monsieur le Ministre, l'expression de ma reconnaissance et de ma haute considération. »

Kaj Zamenhof skribis al Javal (3), la 13^{an} de oktobro 1905 :

« Tre estimata sinjoro ! – Mi sendas al Vi nun la leteron, kiun mi skribis por la ministro de instruado, en lingvoj franca kaj esperanta laŭ la teksto, kiun Vi bonvole sendis al mi, kaj por kiu mi kore Vin dankas. Se Vi eble trovos post konsiliĝo kun generalo Sebert, ke la

formo ekstera de mia letero estas ne bona, tiam mi ĝin reskribos kaj sendos al Vi alian ekzempleron.»

Rilate al la teksto en Esperanto de la danka letero, Waringhien resendas al *Originala Verkaro de L.L. Zamenhof* de Dietterle (4), kiu fontis el ĵurnalo *Esperanto*, n° 14, de la 17^a de decembro 1905, de P. Berthelot, kies redaktoro estis Ch. Lambert.

Jen ekzakte la teksto de *Esperanto* :

« Sinjoro Ministro, – Mi scias, ke via influo multe kunhelpis al la honoro, kiun faris al mi Sinjoro la Prezidanto de la Respubliko, aligante min al la rangoj de la Honora Legio, kaj mi deziras adresi al vi persone mian dankon por tiu-ĉi multevalora kuraĝigo, kiun la Franca Registaro donis al la afero de la helpa lingvo internacia.

« Estis al mi tre agrable, Sinjoro Ministro, vidi tiun aferon tiel bone akceptita en lando, kiu ĉiam ludis la plej gravan rolon en la homaraj progresoj.

« Mi estis ankaŭ tre flatita de la favora akcepto, kiun vi faris al mi, tuj post mia alveno en Parizo.

« Post la granda sukceso de la internacia kongreso esperantista en Boulogne-sur-Mer, mi permesas al mi esperi, ke Francujo estos la unua, kiu enkondukos en la publikajn lernejojn, la instruadon de la lingvo, kiu faciligos kaj disvolvos senlime la rilatojn inter ĉiuj popoloj kaj, sekve, certigos la propagandon de la liberalaj ideoj, kun kiuj la nomo de Francujo estas nedisigeble ligita.

« Volu akcepti, Sinjoro Ministro, la esprimon de mia dankemeco kaj de mia alta estimo.»

Kiamaniere la teksto de la danka letero iris al la redakcio de la koncerna ĵurnalo? kaj kiu ĝin tradukis? Al tiu duobla demando mi

ne havas respondon, sed, kio certa, mi ne emas kredi, ke la montrita traduko estas de Zamenhof pro tio ke :

– « *J'apprends* » devus esti « Mi ekscias » aŭ « Mi ĵus sciis », sed ne « Mi scias ».

– « *Mes remerciements* » devus esti « Miajn dankojn ».

– « *Un pays qui, toujours, s'est mis à la tête des progrès humanitaires* » devus esti « En lando, kiu ĉiam sin situigis ĉe la pinto de la homaraj progresoj » anstataŭ « En lando, kiu ĉiam ludis la plej gravan rolon en la homaraj progresoj ».

– « *Dès le lendemain de mon arrivée à Paris* » devus esti « La morgaŭna tago de mia alveno en Parizo », kaj ne « Tuj post mia alveno en Parizo ».

– « *Il doit m'être permis d'espérer que la France sera la première* » devus esti « Estu al mi permesate esperi, ke Francujo estos la unua » anstataŭ « Mi permesas al mi esperi, ke Francujo estos la unua ».

– « *Considération* » nepre « Konsidero » anstataŭ « Estimo ». Ĉu oni povas imagi, ke Zamenhof skribis « Mia alta estimo » al la ministro !?

Kiam Javal transdonis al la kabineto de la ministro la dankan leteron de Zamenhof kaj ĝian tradukon, li petis la permeson ilin diskonigi (propagandcele por la lingvo), sed la ministerio rifuzis. Estis bato por la afero Esperanta ĉe la plej altaj francaj instancoj malgraŭ la ordeniĝo de Zamenhof, kiu restis sen senteblo sekvo kaj eĉ ne estis publikigita en la *Journal officiel de la République française*.

(1) *Postrikolto de ludovikaĵoj*, Ludovikito, Kioto, 1985, p. 196-197.

(2) Ekzakta kopio de originala manuskripto.

(3) G. Waringhien, *Leteroj de L.L. Zamenhof*, 1948, p. 208-209.

(4) J. Dietterle, *L.L. Zamenhof, Originala Verkaro*, F. Hirt & Sohn, Leipzig, 1929, p. 437-438.

Pentrado sur objektoj

Verkis
Brigitte Bourdet.

NE FORĴETU viajn malnovajn objektojn el ligno, metalo, nek flor-potojn. Transformu ilin en ornamajn objektojn!

Unue preparu la surfacon de la objekto, per sengrasigo, pumikado, eble senoksidigo.

La preparado de materialo ne estas la plej entuziasmiga parto de la realigado, ĝi tamen estas nepre necesa al la sukceso de la projekto.

Iloj :

- brulalkoholo, por sengrasigo;
- sablopapero etgrajna, por la ligno;
- spongo kaj tukpeco;
- kontraŭrustaĵo, por la metalaj materialoj.

Foto 4. – Brigitte
pentradas sur kruĉo,
dum staĝo en Greziljono.



Via materialo estas preta por la ornama etapo, kiu postulos multe da pacienco kaj da tempo.

Vi povas uzi restaĵojn de akrila farbo el grandaj potoj, aŭ aĉeti diverskolorajn farbotubojn aŭ farbopotojn sed nepre akrilajn.

Iloj :

- penikoj : plata, maldika, ronda ;
- papera glubendo ;
- grasa krajono (« 2B » aŭ « 3B ») ;
- grifelo ;
- paŭspapero.

Farbu per blanka farbo la objekton.

Lasu ĝin sekiĝi dum dudek kvar horoj.

Spertuloj povas rekte sur la objekto desegni aŭ pentri bildon. Komencantoj aŭ malplej spertaj paŭsu skizon de la bildo.

Jen metodo por paŭsi.

1. Paŭsu vian elektitan bildon. Restreku per grasa krajono sur la reverso de la paŭspapero, konturu la desegnaĵon.
 2. Fiksu per papera glubendo la paŭspaperon sur la objekton.
 3. Restreku zorge per grifelo la konturon de la desegnaĵo.
 4. Denove streku la skizon per nigra farbo kaj maldika peniko.
- Lasu sekiĝi dum dudek kvar horoj.

Sekvantan tagon, farbu la objekton per hela farbo (flava, blanka, helblua). La nigraj konturoj estos ankoraŭ videblaj. Tio faciligos vian laboron, kiam vi pentros vian desegnaĵon.

Lasu denove sekiĝi dum dudek kvar horoj.

Nun ĉio estas preta, por ke vi pentru vian desegnaĵon.

Nova Danco : Esperanto-tango

Verkis
Lorenzo Tomezzoli.



Foto 5. – Lorenzo
dum staĝo en Greziljono.

JEN nova danco kun kanto en Esperanto en ĝi. Mi havas ideon pri nova stilo de danco, kies ritmo jam troas en mia kapo, sed ĝi ankoraŭ ne estas preta... Provizore ni nomu ĝin «kata danceto», sed mi trovos pli trafan nomon.

Pri *Esperanto-tango* mem kion diri? La historieto estas nur dueto inter du geesperantistoj, kiuj amas sin, ĉar ili amas Esperanton...

Krom tio, ĉio dirinda estas en la teksto mem,

kiu konsistas el vira strofo, virina strofo kaj dueta rekantaĵo.

Sed mi estas nur Lorenzo Tomezzoli, nek Astor Piazzola nek Karlos Gardel, kiuj estas «tangistoj», kiujn mi ege admiras.

—

Esperanto-tango

(Vire.)

Al <u>venu</u> , kaj kun mi, ĝis nokto <u>fino</u> ,	la tangon dancos vi, vi amik <u>ino</u> .
Do Fa Do	
Jen tango, kun kortuŝa melo <u>dio</u> .	Per ĝi, mi kantos por via gr <u>acio</u> .
Sol Do	
Eterna estas tia milda <u>sen</u> to.	Plej bele ĉiam brilos la tener',
Fa Mi	
Kiu por <u>ni</u> , en ama firmam <u>ento</u> ,	aperos <u>ki</u> -el stelo de l' <u>esper'</u> .
rém lam rém Do Sol Do	

(Dueta rekantaĵo.)

Ĉar <u>Esperant'</u> kunligas <u>nin</u> ,	per forte-ga kora inklin'.
Do rém Sol Do	
Duo-pe ni dum tuta <u>vivo</u> ,	kun paco je nura mot <u>ivo</u> ,
Fa fam Sol	
Ĝis <u>cel'</u> , decide, iros <u>ni</u> ,	ĉar <u>lingvo</u> nia taŭgas <u>pli</u> ,
Fa Do Fa Sol Sol	
<u>Pli</u> ol iu filozof <u>i</u> ,	ĝi estas kora melodi'.
Fa Do Sol	

(Ine.)

Konsente, mi kun vi, dum horo <u>plia</u> ,	la tangon dancos ja, amiko <u>mia</u> .
Do Fa Do	
Jen tango, kun beleta melo <u>dio</u> .	Per ĝi, mi aŭdos pri mia gr <u>acio</u> .
Sol Do	
Sincera ŝajnas milda la kant <u>eto</u> ,	kaj certe ĉiam brilos la tener',
Fa Mi	
Kiu por <u>ni</u> , en nuna la du <u>eto</u> ,	resonos <u>ki</u> -el voĉo de l' <u>esper'</u> .
rém lam rém Sol Do Sol Do	

(Dueta rekantaĵo.)

Esperanto-tango

Paroloj kaj muziko : Lorenzo Tomezzoli

♩ = 65

al-venu, kaj kun mi, ĝis nokto-fi-no la tangon dancos vi, vi ami-

Do Fa Sol⁷ Fa

ki-no jen tango kun kortuŝa melo-di-o per ĝi mi kantos por vi-a gra-

Do Do Sol⁷ Ré m Si⁷

ci-o e-terna estos ti-a milda sen-to plej bele ĉiam brilos la te-

Mi m Sol⁷ Do Fa Sol⁷ Fa

ner'-ki-u por ni, en ama firma-mento a-peros ki-el stelo de'es-

Mi Ré m Mi La m Ré m Sol⁷

Fine

per'ĉar Es-pe-rant', kunligas nin, per for-te-ga kora in-

Do Sol⁷ Do Do Ré m Sol⁷ Fa

klin'du-o-pe ni dum tuta vi-vo, kun Paco, je nura mo-

Do Do Si m⁹ Sol

ti-vo ĝis cel'de-ci-de i-ros ni ĉar... lin-gvo ni-a taŭgas

Sol Fa m Do

pli pli ol i-u fi-lo-zo-fi' ĝi estas kora melo-di'

Sol⁷ Do Do Sol⁷

D.C.

Kun krajono en la poŝo

Verkis
Lilli Giloteaux.



Vilaĝo Vogüé, Francio, la 4^{an} de julio 1996.

DUM Esperanto-renkontiĝoj vi eble jam vidis min desegni aŭ pentri. Mi vere tre ŝatas tiamaniere okupi miajn liberajn horojn, en mia regiono, en aliaj partoj de Francio aŭ en aliaj landoj.

Dum mi akvarelis eksterdome, laŭ la naturo, okazis al mi diversaj aventuretoj. Jen kelkaj el ili...

Iam, en la urbo Bazelo (Svislando) mi volis pentri ĉarman placon. Ĉar nenie en la ĉirkaŭaĵo troviĝis benko, mi tutsimple sidiĝis sur la trotuaron. Kelkajn minutojn poste, najbara komercisto afable alportis al mi seĝon. Mi ĝojis kaj povis pli komforte labori.

En Islando dum malvarma julia tago mia amikino pruntedonis al mi gantojn por ekstere pentre fiksi la belecon de lago kaj montoj. Estis la unua fojo, kiam mi pentris per gantitaj manoj.

Kaj, dum ferioj en Aŭstrio, post rompo de mia dekstra manradiko, mi devis daŭrigi desegnadon per la maldekstra mano.

En Sydney, mi spertis multajn agrablajn horojn pentrante, sed ankaŭ kelkajn malagrablaĵojn. Iun matenon mi promenis al belega loko, kaj komencis pentri sidante en la ombro de eŭkalipto. Subite mi sentis bestetojn sur mia nuko. Ho! Terure! Mi estis plenplena de etaj raŭpoj. Ili estis ĉie: sur miaj haroj, brakoj, vestoj kaj kruroj. Mi fuĝis, kaj necesis longa tempo por liberigi min de ĉiuj bestetoj.

Alian tagon mi pentris sur Rocky Point en Balmoral. Forta vento-puŝo faligis grandan dikan branĉon tuj apud mi. Mi vere bonŝancis, ke ĝi ne trafis mian kapon.

Sur la hispana insulo Majorko mi pied-ekskursis laŭlonge de la sovaĝa marbordo. Allogis min ronda gvatturo staranta sur impona roko. Mi pene malsupreniris tra kruta rokaro ĝis la maro, kaj mi akvarelis. Iom poste turista paro hazarde alvenis por admiri la belan marbordan panoramon. Ili fotis (ankaŭ min), kaj ni babilis. Kiam la viro deziris reiri, la edzino petis lin atendi, ĝis kiam mi finis mian bildon. Ŝi opiniis, ke estus tro danĝere por mi tutsola regrimpigi ĝis la strato.

Multe malpli agrabla estis la travivaĵo apud la rivero Arno en Florenco (Italio). Mi sidis proksime al la ponto Ponte Vecchio kaj



Urbo Haguenau, Francio, la 21^{an} de majo 2002.

pentris. Kiam juna viro admiris mian bildon, alia viro, komplico, ŝtelis mian fotoaparaton kaj rapide fuĝis.

Amuza estis epizodo en olivarbejo. Scivolema azeno provis ekmanĝi mian skizoblokon kaj ne facile lasis min forpeli ĝin. Alifoje nigra korvo kun pinta beko timigis min. Ĝi venis tute proksime al mi. Eble ĝi supozis, ke mia farbkesteto enhavas manĝaĵon. Mi forpuŝis plur-foje la birdon, sed ĝi ĉiam denove ĝenis min.

En Ridderkerk (Nederlando) mi kolore surpaperigis apudriveran plor-salikon, aparte ĉarman. Je mia granda bedaŭro la postan tagon la arbo estis forhakita.


Dum ferioj en Lech (Aŭstrio) pro nokta pluvo ne eblis sidi sur la herbejo antaŭ pentrinda panoramo. Lucien kaj mi rimarkis malgrandan benkon, kiu staris antaŭ dometo kun fermitaj ŝutroj. Post iom da hezito, ni forportis ĝin ĝis la loko, de kie ni ĝuis belegan rondrigardon. Mi tuj ekpentris. Subite alvenis viro, kiu miris pro la malapero, pli precize translokiĝo, de sia benko. Tamen li afable permesis al mi fini mian bildon. Kompreneble ni ne forgesis reloki la benkon antaŭ la domo de la posedanto.

En germana urbo mi sidis apud la enirpordo de preĝejo kaj akvarelis. Duonhoron poste venis eksterlandaj turistoj : ili volis pagi al mi enirprezon.



Urbo Sète, Francio, la 24^{an} de aŭgusto 2001.

Kortuŝe amuzis min epizodo en Turkheim (Francio). Tie mi komencis pentri ĉarman Alzacan domon. Kiam la posedanto rimarkis tion, li rapide foriris por reveni dek minutojn poste kun korbo plena je geranioj. La florojn li senprokraste plantis en siaj antaŭfenestraj kestoj. La ruĝaj geranioj certe plibeligis la domon, kaj kompreneble mi aldonis ilin sur mian bildon.



Dum multaj jaroj Lucien kaj mi vizitis tre diversajn Esperantenkontiĝojn en- kaj eksterlande. Pri multaj kongresoj, staĝoj kaj privataj vojaĝoj, mi konservas desegnojn kaj akvarelojn, ekzemple :

Montpellier,
Grésillon, Le Mans,
Sète, Barlaston,
La-Chaux-de-Fonds, Sydney,
Rotterdam, ktp.

Entute pli ol tri mil paperaj memoraĵoj pentritaj surloke.

Urbo Nürnberg, Germanio,
la 22^{an} de septembro 1994.

La Neordinara Vivo de teksisto tra la kvin kontinentoj Bonkonduta Militisto !

Verkis
Klod Martins.

EN LA jaro 1944. La dua mondmilito finiĝas en Francio. Hejme Klod aĉetas ĉiujn mapojn troveblajn ĉe vendistoj, kaj najlas ilin ĉe la muroj de sia dormoĉambro. Per flagetoj li sekvas la movadojn de armeoj, ĉar li kaŝe aŭskultas la radioelsendojn de London. Foje li pli bone regas la situacion ol la ĵurnalistoj de lia urbejo.

Klod prognozas la eblajn datojn, kiam la armeoj elboatigos por rekonkeri Francion : aŭ la 9^{an} de majo, aŭ la 6^{an} de junio, aŭ la 3^{an} de julio. Fakte la elboatigo okazas la 6^{an} de junio 1944. Klod ne elektis tiujn datojn hazarde, sed ĉar tiam estas plena Luno : tajdo tre malalta ebligas iri piede tra la fostoj, kaj ses horojn poste tajdo tre alta ebligas al la boatoj superpasi la fostojn.

Deksep-jara Klod laboras kiel teknikisto pri teksiloj ĉe Deffresne Canet en la urbo Lys. Li helpas ĉefon. Tial li lernas, kaj li fariĝos ĉefo.

Iu maljuna laboristo boras truojn en la plankon de la fabriko por meti la piedojn de maŝino. Sed estas tempo por manĝi, kaj li foriras. Dumtempe Klod kolektas monerojn, kaj kaŝas ilin en iun truon sub tero. Reveninte la maljunulo plu boras kaj trovas moneron, sekve duan, kaj trian, ktp. Li boradas la truon atentante, ke neniu vidas lin. Li enpoŝigas sian trezoron, dum la laboristoj kaŝiĝintaj malantaŭ la maŝinoj rigardas lin ridante.

Navedo de teksmaŝino kelkfoje flugas tra la fabriko. Klod asertas, ke la kaŭzo estas la virinoj, kiuj iras al tualetejo. Ŝajnas stulte !

Tamen virinoj, kiuj malfermas la pordon de la korto enirigas mal-sekan venton de ekstere. Tiu vento malsekigas la ŝnuretojn de la teksmaŝinoj, kiuj malstreĉiĝas kaj devojigas la iradon de la navedo.

Dum la milito la familio suferas pro malsato. La infanoj fosas la teron de kampoj por trovi kelkajn terpomojn. La patro kaj la filo kulturigas ĝardenon. La patrino purigas lernejon kaj tial rajtas pluki la pirojn de ties korto. Iu fratino laboras ĉe farmbieno, ktp.

Ili loĝas en la urbo Hem. Tie estas la plej granda municiejo de norda Francio, ĉefe en la parkoj de la kasteloj Olivier kaj Marquise. La 2^{an} de septembro 1944, la Detĉlanda (germana) armeo decidas eksplodigi ĉiujn municiojn. La familio evakuiĝas al sekura loko : kelo de riĉa domo, fine de strato. (Entute la familio evakuiĝis ses-foje.)

Atendante la unuajn eksplodojn Klod sidas sur kanapo en la salono legante geografian libron. Subite pro eksplodego Klod svenas. Ventego malfermas internan pordon, glitigas la kanapon kun Klod al la manĝoĉambro, kaj refermas la pordon! Klod rekonsciiĝinta kuras al la kelo. La eksplodoj daŭras plurajn horojn.

Post kvietiĝo Klod iras laŭ la strato por konstati, ĉu la familia domo rezistis, sed okazas pliaj eksplodoj faligantaj teren kamentubojn, tegolojn, vitrojn, ktp. Tiam Klod al la kelo kuregas per paŝoj grandegaj saltante super falintaĵoj.

Matene alvenas laŭ paralela strato la Gritbritena (brita) armeo, kiu pasas dum pli ol du tagnoktoj kun abunda materialo. Gritbritena oficiro petas de Klod la vojon al urbo Leers. Tie la armeo traĉiros Belgion kaj eniros Nederlandon.

Sekvantan matenon Klod vidas la ĉielon laŭ kvar horizontoj plenplenan da aviadiloj. Ĉiu el ili tiras unu glisilon, en kiu estas tanko. La ĉielo aspektas kiel moviĝanta tapeto. Admirinda spektaklo!

Klod kun kamarado malplenigas kuglojn kaj metas pulvon kaj dinamiton en porbiskvitan ladan keston en malplena fabriko. Li

ĵetas en ĝin flamigitan paperon, kaj tuj kaŝas sin malantaŭ kolonoj. La kesto eksplodas longtempe kun teruraj bruegoj.

1946. Klod ŝatas bicikli. Iun vesperon li foriras vintre nokte al la urbo Arras, kvankam pluvegas kaj ventegas. Ne trovinte la junularan domon, ĉar estas senhoma nokto, li tranoktas sur benko de aŭtobusa haltejo. Je la tria matene Klod daŭre biciklas ĝis la gastejo de la urbo Amiens. Entute 260 km irovevene. Alifoje biciklato al la urbo Malo-les-Bains, baniĝo en la maro, kaj reveno al Hem, ĉiam kontraŭ la vento, kiu turniĝis intertempe. Entute 180 km.

En fabriko Klod deknau-jara jam estas ĉefo, kaj riparas la mekanismon ĵakardo kun miloj da nadloj kaj hoketoj. Plurfoje li petas plian salajron.

Junion 1947. Dudek-jara Klod soldatiĝas en la urbo Soissons. Li skribas al siaj gepatroj :

« Kiam vi ricevos mian leteron, mi estos en Afriko ! »

Trajne ĝis Marseille, ŝipe ĝis Alger, piede vice al la kazerno. Klod devojiĝas de la kolono de soldatoj pro la forta sunbrilo en siajn helajn okulojn. La sunego lin malsanigas. Tamen vespere post nokt-iĝo li provas eliri el la kazerno enmiksiĝinte en grupon de malnovuloj. Tiutempe Alger estas admirinda urbego, kies ĉiuj ŝoseoj kaj trotuaroj estas asfaltitaj, antaŭ modernaj magazenoj. Estas elektraj lumoj ĉie en la urbo, kiam en la urbego Roubaix gasaj lampoj prilumas pavimerojn. Klod aĉetas kelkajn tomatojn, kaj por reeniri la kazernon li naive prezentiĝas al la deĵoranto : « Mi malsatas ! »

Poste li atingas trajne la urbon Oran, kaj la kazernon La Senia.

La duan semajnon, por havi eblecon iri en la vilaĝon, la soldatoj postulas ĉeesti meson! La leŭtenanto tiam grupigas ilin kaj demandas : « Kiuj fakte ne intencas iri al la meso ? » Klod tuj eliras el la vico, kaj sekvas lin du aliaj. La oficiro ordonas al adjunto : « Tiuj cent dudek nepre iros al la preĝejo kaj same revenos. »

Kaj al la triopo : « Sekvu ilin ĝis la vilaĝo. »

La duŝiloj ŝprucigas nur salan akvon. Iun matenon pluvas torente. Klod eliras nude kaj sin duŝas sub freŝa akvo de la ĉielo! Soldatoj paradas en dudek centimetroj da akvo. Tamen ĉe la fino de la parado ne plu estas akvo, ĉar sorbita de la grundo!

Oktobron 1947. Dimanĉe Klod promenas dum kvardek unu kilometroj tra la ravino de la Vierge survoje al la vilaĝo Mizergien kun kamarado. La duopo revenas je la unua matene kun sangaj piedoj. Tial ili ne iras pafi kanonon. Fakte Klod neniam pafos.

Novembron 1947. Klod estas liberigita, ĉar li estas la sola knabo de la familio. Li ŝipas de Oran ĝis Sète. Dumtage estas kvieta maro, sed la ŝipo devojiĝas pro mino. Dumnokte okazas uragano. Ondoj saltas super la ŝipon kaj falas aliflanken. Necesas ne fali akven!

Klod laboras dum nur du semajnoj. Denove li soldatiĝas, ĉar tiam okazas gravaj strikoj en la karbo-minejoj de norda Francio.

Iun tagon li deĵoras en kuireja kamioneto. Iu strikanto kaptas lian fusilon. Klod elsaltas sur ĝin kaj ĝin kaptas dirante dialekte : « Lasu ĝin. » Kamarado diras : « Lasu lin, li estas *chti-mi*. » (t.e. nordulo.)

En la kazerno de Amiens, ĉiuj norduloj, kiuj deĵoras ĉe oficejo, semajnfine fuĝas hejmen per falsaj forpermesoj. Foje Klod trajne kunportas sian biciklon, kaj per ĝi iras viziti la grotojn Naours.

Sed iun dimanĉon adjudanto vokas ĉiujn nomojn. Ŝajne ĉiuj norduloj laŭdire ĉeestas meson! Fakte ili estas hejme. La adjudanto alportas la liston al kapitano, kiu respondas : « Ne merdumu min per tio ! » Kaj la falsaj forpermesoj daŭras.

Majon 1948. Klod ricevas ateston pri bona konduto! kaj alian pri liberiĝo, sed nur por sekvanta tago. Tiam Klod kun du kamaradoj kaj kun sia biciklo transpasas muron kaj tuj trajne revenas hejmen.

La Enigmo de Tutokajmono

Verkis
Lorenzo Tomezzoli.

CERTE vi ne scias, ke en kongreso de Sat-amikaro en Bulonjo-ĉe-maro, inter la 5^a kaj la 7^a de aprilo 1980, mi renkontis faraonon. Li nekonate partoprenis, sub falsa nomo...

Li malkaŝis al mi ĉion pri li, ĉar li tuj vidis, ke mi estas elstara persono. Elstara, nek pro miaj bonaj kvalitoj (mi estas nur ordinara persono), nek pro mia tute mezbona voĉo. Elstara, nur pro la fakto, ke mi kunhavis gitaron kaj aŭdacis publike kanti...

De tiam, mi scias ĉion pri li, sed mi promesis raporti nur tion, kion li permesis al mi ripeti!

Do jen parto de la historio de tiu faraono.

Foto 10. – Aprilon 1980, en kongreso de Sat-amikaro, Lorenzo pozas kun sia gitaro.



Li estis tre riĉa kaj saĝa kaj scivolema faraono. Lia nomo estis Tutokajmono.

Sed, post lia morto, negismaj reviziistaj skribistoj akordiĝis por ŝanĝi lian nomon, kaj forviŝi eĉ ĉiujn spurojn de la progresoj, kiujn li enkondukis en sian landon. Ĉefe lian lingvo-laboron celis la neismaj skribistoj.

Fakte, li trovis sciencon rimedon por vojaĝi tra la tempo, li eĉ partoprenis en kongresoj de Esperanto.

Kaj li simpligis la egiptajn hieroglifojn (jen nepardonebla krimo...). Ankaŭ Esperanton li simpligis. Kiel ekzemplo, jen skribaĵo de Tuto-kajmono :

77K17-
L GU KYRA1- K1R1-

Kion signifas tio ?

Solvo kaj sekvo en venonta numero...

Verku Kulturajn Kajerojn

Kial vi ?

Ĉar en niajn paĝojn
ne venas komencantoj kun eminentuloj, ne instruistoj kun lernantoj,
sed homoj kun homoj.

Pri kio ?

Por la parto « Historio de kulturdomoj » :
Studu la (eĉ proksiman) pasintecon de via preferata kulturejo ;
Rakontu ĝin kiel eble plej neŭtrale, ne per opinioj sed per faktoj ;
Ne provu priskribi ĉion : elektu simplan temon, klaran atakangulon.

Por la parto « Kleriĝado » :

Klerigu nin per viaj fakaj scioj.

Por la parto « Distriĝado » :

Distru nin per rakonto originala kaj zorge konstruita.

Aŭ partoprenu nian anoncotan ludon.

Sed ne pri kio ?

Ĉar ni celas kleriĝadon, emancipadon, ni nenion publikigu pri :
politiko ; religio ; ekonomio ; pseŭdoscienco...

Krome estos rifuzitaj :

jam konataj tekstoj ; (plejofte) tradukaĵoj ; (nepre) krudaĵoj.

Kiel ?

Ĉe ni « verki » signifas : skribi, desegni, fotadi, komponi tuton...

Sendu vian proponon al

Dominik Bertrand, 7, rue des Brulis, 77320 Jouy-sur-Morin, France
« nasf2008@orange.fr ».